



N-roj 28-29

20.6.1974

sesa jaro, n-roj 2-3

Afergvidanto de AREK: Ivar PAULSSON, Algatan 3, S-171 33 SOLNA (Svedujo), p.ĉ.k. 51 57 85-4; redaktoro de "FENIKSO": d-ro Antonio DE SALVO, C.P. 4017, I-00100 ROMA APPIO (Italujo); jara kotizo: 10 respondkuponoj aŭ egalvaloro (la redaktoro ankaŭ estas preta pagi la kotizon de tiuj, kiuj sendos al li sialandajn neuzitajn tutaĵojn/aerogramojn, kartojn aŭ kovertojn kun oficiale presita poŝtmarko/en nominala valoro de 10 afrankoj de leteroj al eksterlando).

PARDONPETO

Mi devas peti pardonon pro la granda malfruo en la aperigo de "Fenikso", kaj pro mia longa silento; amasoj da korespondaĵoj kuŝas antaŭ mi neresponditaj.

Kaŭzo de ĉio estis mia translokiĝo al nova hejmo, kiun mi efektivigis komence de majo: tri tagoj estis bezonataj por transporti ĉiujn miajn aĵojn, inter kiuj, kiel oni povis konstati, pli ol 3.000 kilogramojn da libroj, esperantaĵoj kaj filatelaĵoj (miaj antaŭkalkuloj montriĝis tro optimismaj!). Aldonu al tio, ke en la nova konstruaĵo la lifto komencis funkcii nur antaŭ kel-

kaj tagoj, kaj ke mi devis mane (kaj piede) transporti almenaŭ 1.500 kilogramojn de la dua etaĝo, kie mi loĝas, ĝis la naŭa etaĝo, kie troviĝas mia mansarda deponejo. En tiaj kondiĉoj, mi kuraĝas esperi je via komprenemo kaj ekskuzo .

Hodiaŭ mi klopodas reakiri vian konfidon, aperigante eksterordinare ampleksan, duoblan numeron de la bulteno, kun la espero, ke ĝi plaĉos kaj utilos al vi, malgraŭ la hasto, kun kiu mi ĝin pretigis.

Konsiderante, ke la antaŭa eksperimento pri sendado al socialismaj landoj pere de s-ro BIESIADA (kiun mi korege dankas, ankaŭ nome de la AREKanoj!) ŝajne kontentige sukcesis (nur en unu kazo, ĉe korespondanto el GDR oni tamen konfiskis la enhavon), mi denove profitas la saman metodon por la sendado ankaŭ de la hodiaŭa ekzemplero. Mi estos danka kaj ĝoja, se laŭpove mi ricevos konfirmon, ke la bulteno atingis vin.

Laŭplane, la venonta numero de "FENIKSO" aperos la 20-an de septembro.

Bonvolu noti mian novan adreson: C.P. 4017, I-00100 ROMA APPIO, Italujo (temas pri leterkesto ĉe Poŝtoŝejo, ĉar en la nova domo, ankoraŭ ne finkonstruita ekzistas nek citofono, nek pordisto, nek leterkestoj).

Amike Antonio DE SALVO

NOVAJ MEMBROJ

Ni bonvenigas: ,

60) Inĝ. Pál TOTH, Tereny-u 58, H-1172 BUDAPEST (Hungarujo); kol.: Sta, Glm, Pm, Tut.;

61) R.HAABVERE, V.Tähe 18 A-2, USSR-202400 TARTU (Sovetunio); kol.:Glm.

NEESPERANTISTAJ POŝTMARKOJ POR ESPERANTO-KOLEKTO

En n-ro 23 de "FENIKSO" skribas s-ano Barto Ŝik pri tio, ke ni devas atenti pri filatelaĵoj ne nur pure esperantaj, sed ankaŭ pri tiuj, kiuj iumaniere rilatas al la temo Esperanto, kaj publikigas liston de honoraj protektantoj de Universalaj Kongresoj sur poŝtmarkoj.

Mi substrekas liajn vortojn plene. Kompreneble, ĉiu el ni povas decidi tute libere, ĉu alpreni al la kolekto pliajn poŝtmarkojn / kies rilato al nia temo ne estas tuj videbla je unua vido / aŭ ne: sed mi opinias, ke ĉiu progressa kolektanto post pli malpli longa tempo respondos al tiu demando jese. Ankaŭ mi mem komencis antaŭ jaroj nur per E-poŝtmarkoj: poste aldoniĝis stampoj kaj tutaĵoj, - kaj kiam mi sciis iom pli el la historio de Esperanto, kaptis min ideo montri la historion de nia lingvo per filatelaĵoj pli vaste, pli detale: kaj tial mi serĉis kaj ĉiam serĉas plian materialon taŭgan por la kolekto/.

Mi alprenis poŝtmarkojn kaj alian filatelan materialon neesperantan: stampaĵoj, tutaĵoj, afrankitaj kovertoj ktp, per kiuj mi dokumentas /kompreneble, ĉiam kun klariga teksto/ ekzemple:

- honorajn protektantojn de Universalaj kaj SAT-kongresoj;

- eldirojn de famaj homoj pri Esperanto /ŝtatestroj, filozofoj, verkistoj, scienculoj, Nobelpremitoj, Papoj, ktp/;

- esperantistojn kaj apogintojn de Esperanto;

- la plej gravajn mondfamajn verkistojn, kies verkoj estis tradukitaj esperanten;

- diverajn organizaĵojn, kiuj oficiale rekonis aŭ uzas / uzadis/ Esperanton (Radiostacioj, internaciaj

foiroj en diversaj urboj, Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesco, Internacia Laboroficejo, firmaoj ktp),

- kaj ankoraŭ kelkajn aliajn rilatojn al la temo.

Jam el tiuj ĉi linioj oni povas vidi, ke elekto de materialo estas plejparte afero pure privata: dum iu ne ŝatos alpreni verkistojn, alia kolektanto povas envicigi en la kolekton nur kelkajn, tria serĉos ĉiujn troveblajn poŝtmarkojn, ktp. Pro tio estas ankaŭ malfacile kompli iun katalogon pri tiu ĉi materialo, kvankam mi revas pri tio foje ĝin prilabori, kiam la tempo permesos. Mi havas jam sufiĉe da informoj - sed eble estus bone, se ceteraj kolektantoj dirus sian opinion pri la afero, por ke oni povu prijuĝi, ĉu ekzistas intereso pri tia pliampleksigo de nia temo.

Eventualaj kunlaborantoj estas serĉataj.

Estas fakto, ke kolekto, kiu enhavas nur Esperanto-poŝtmarkojn kaj stampojn, ne havas jam ŝancon ricevi plej altajn medalojn ĉe diversaj filatelaj ekspozicioj: necesas alpreni tutaĵojn kaj ankaŭ alian materialon. Nu, kaj se oni ne volas ekspozicii - ĉu filatelisto povas iam kontentiĝi per io jam akirita kaj preterlasi la okazon envicigi en la kolekton / por sia propra ĝojo / almenaŭ kelkajn aliajn poŝtmarkojn kun rilato al nia temo? Finfine, ĉu ne apartenas al la kolekto pli la poŝtmarko, ekzemple, de jugoslava Prezidento TITO, ol ekzemple soveta poŝtmarko ĉe Centra Telegrafo, kiun ni tamen ĉiuj envicigas? Ĝi portas surskribon en Esperanto, kompreneble - sed kian internan rilaton al nia temo havas ĉi tiu pm?

Malfacilaĵo kuŝas en tio, ke pluraj poŝtmarkoj el la pli supre menciitaj temoj Aperis en serioj; oni do devas aĉeti kompletajn seriojn, kiuj ne ĉiam estas malmultekostaj. Sed - eble ni povus ligi niajn fortojn, ĉu ne? Se kelkaj poŝtmarkoj ekzistas en

serioj / sama bildo, diversaj valoroj/ kial ne aĉeti tiun serion kaj poste vendi al interesuloj ceterajn unuopajn nebezonatajn pm? Mi mem havas multajn tiujn pm, el pli valoraj ekzemple svisajn konstruaĵojn de Unuiĝintaj Nacioj (rekonis Esperanton en 1922) kaj de Internacia Laboroficejo (Zumstein 213,214), ;protektanton de la 16-a Universala Kongreso Prez. HAINISCH (Aŭstrio, Zumstein 465-468) ktp, ĉiujn neuzitajn. Nun mi havas unikan eblon aĉeti serion neuzitan de aŭstra Prez. MIKLAS (eldiro pri Esperanto, honora protektanto de la 28-a Universala Kongreso), sed ĉar ĝi kostas 120 svisajn frankojn / 6 samaj portretoj, Zumstein 486-491/ mi serĉas eventuale lajn pliajn interesulojn, kiuj sin turnu rekte al mia adreso: Vladimír VAŤA, Revoluĉnì 54, CSR-312 O2 PLZEŇ, Ĉeĥoslovakio .

Vladimír Vaňa

P.S. Mi petas pardonon pro la malfruo, kun kiu aperas la supra, interesa kontribuaĵo de nia kolego, kaj esperas, ke malgraŭ la prokrasto oni sukcesos aranĝi la proponitan "kooperativan" aĉetadon. Persone, mi plene samopinias kun s-ro Vaňa pri la neceso ne limiĝi al temoj jam unuavide esperantaj, kaj vidus kun granda intereso kaj ĝojo la aperon de katalogo pri materialo larĝsence ligita kun Esperanto. Kiel redaktoro de Radio Roma/ Esperanto-elsendoj, mi jam delonge kolektas detalojn pri famaj personoj iel en rilato kun esperanto, kaj tre ofte okazas, ke post kelka tempo aperas filatelaĵo pri persono, pri kiu mi jam notis ion: vidu, ekzemple, kelkajn miajn artikolojn en ĉi tiu sama buleno.

Antonio DE SALVO

Ĉu vi jam pagis vian kotizon? Se ne, rapidu!!!

ESPERANTISTA LINGVISTO HONORIGITA DE
POLA POŝTO

En oktobro 1973-a la Pola Poŝto eldonis serion de tutaĵoj / poŝtkartoj, kun presita pm/ okaze de la jaro de Pola Scienco. Unu el ĉi tiuj pk havas apartan intereson por la esperantistoj, ĉar ĝi estas dediĉita al la memoro de Zenon KLEMENSIEWICZ, pedagogo kaj lingvisto.

KLEMENSIEWICZ, naskiĝinta en la jaro 1891-a kaj tragike mortinta la 2-an de aprilo 1969-a, interesiĝis la unuan fojon pri Esperanto jam en 1905-a, kiam li, ankoraŭ 14-jara gimnaziano en la urbo NOWY SĄCZ lernis la lingvon, ĝin konversacie praktikis kun grupo de kolegoj, kaj ekligis vastan korespondadon. Li ankaŭ tradukis novelon de Henryk SIENKIEWICZ, "Sur Olimpo", kiu aperis en la numero 4-5 de la jaro 1908-a de la E-revuo "Tra la mondo".

KLEMENSIEWICZ daŭre interesiĝis pri Esperanto ankaŭ en la jaroj de siaj studoj ĉe la Jagrlona Universitato en Krakovo. Li ankaŭ apartenis al la estraro de la tiea studenta Esperanto-rondo, kaj paroprenis la Universalan Kongreson de 1912-a, dum kiu li persone kontaktis kun doktoro Zamenhof.

Post la parentezo de la unua mondmilito, profesoro KLEMENSIEWICZ denove interesiĝis pri Esperanto, koncentrante sian atenton antaŭ ĉio sur lingvosciencaj problemoj.

Seninterroppe dum pluraj jardekoj, profesoro KLEMENSIEWICZ subtenis per scienca argumentado, en paroladoj kaj en publikaĵoj, la neceson enkonduki amasan instruadon de Esperanto en la lernejojn; kaj pri ĉi tiu temo ankaŭ okazis aparta interparolo kun la Prezidanto de UEA, profesoro Ivo

LAPENNA, kiu en printempo de 1966-a speciale vojaĝis al Krakovo por interŝanĝi opiniojn pri la ŝancoj de Esperanto en Pollando.

Profesoro KLEMENSIEWICZ verkis, interalie, en 1957-a, antaŭparolon por lernolibro de Mieczysław SYGNAŁSKI, lektoro de Esperanto ĉe la Jagelona Universitato en Krakovo; cetere, profesoro KLEMENSIEWICZ traktis ĉi tiun lektoraton kun zorgema projekto en la periodo, kiam li estis rektoro de la Universitato, kaj ĉiam ~~m~~ li donis sciencajn konsilojn al la esperantistoj, kiuj sin turnis al li.

En 1959-a, okaze de la Zamenhofa Jubileo, profesoro KLEMENSIEWICZ aperigis en la ĵurnalo "Dziennik Polski" artikolon titolitan "Ĉu valoras okupiĝi pri Esperanto?"; la gvida penso estis pruvi, ke ĝi valoras. Pli poste, li disvolvis sian argumentadon favore al Esperanto en aparta broŝuro.

La saman jaron 1959-an, sed pli frue, en la monata revuo "Nowa Szkoła", profesoro KLEMENSIEWICZ, kiel lingvisto kaj pedagogo, subtenis, ke Esperanto povas esti utila eduka instrumento.

En 1961-a, responde al kritikoj, KLEMENSIEWICZ verkis polemikan artikolon por la revuo "Nowa Kultura", sub titolo "Esperanto en la lernejo, alie kontraŭ la nematura kritiko".

Similajn pensojn favore al Esperanto KLEMENSIEWICZ ankaŭ esprimis en pluraj artikoloj aŭ ekdiroj dum enketoj, aperintaj interalie en la revuo "Pola Esperantisto" kaj en la libro "Esperanto? Opinioj de Polaj Sciencistoj".

Kiam la Pola Ministerio por Klerigo kaj Supera Edukado devis aprobi la programojn por instruado de Esperanto, en la jaro 1968-a, profesoro KLEMENSIEWICZ ricevis la taskon revizii la programojn, kiuj fakte estis modifitaj surbaze de liaj rimarkoj.

Apud la problemoj de la disvastigo de Esperanto, kompreneble absorbis profesoron KLEMENSIEWICZ pure lingvaj problemoj, speciale koncerne la lingvan evoluon, kaj la rolon de Esperanto en la scienca medio.

Por kompletigi la skizon de la Esperanto-agado de profesoro KLEMENSIEWICZ (kies informojn ni ĉerpis el "Pola Esperantisto" n-ro 3 de 1973-a), ni diru, ke li estas honora membro de Pola Esperanto-Asocio, kaj membro de la redakta komitato de la scienca revuo "La Monda Lingvo-Problemo", dediĉita al la lingvaj problemoj en la internaciaj rilatoj.

Antonio DE SALVO, Roma, Italujo
(El "Kuriero de Esperanto" ĉe Radio Roma; mi ankaŭ dankas s-ron CHAMARET, kiu pli poste atentigis min pri la sama evento).

ANONCETOJ

Mi interŝanĝas esperantajn glumarkojn, Esp-poŝt stampojn, kolorajn diapozitivojn, ilustritajn poŝtkartojn. 15 maldamajn noveldonitajn glumarkojn mi sendos por 2 interaciaj respondkuponoj, plus 1 por afranko. Respondo certa!

RADNAI Vilmos, H-2331 DUNAHARASZTI, P.O.
Box 40, Hungarujo.))))))

Mi kolektas stampojn pri la temoj: ESPERANTO, MUZIKO (muzikistoj, instrumentoj, koncertoj, kantado, festivaloj, ktp), FERVOJOJ, AŬTOMOBILAJ TEMOJ (ankaŭ trafiksignaloj, avertoj por la kondukistoj kaj piedirantoj, ktp). Mi ankaŭ serĉas tutaĵojn kaj mekanikajn afrankostampojn. Evaristo GIL PALLARES, apartado 875, Barcelona, Hispanujo.

STAMPOJ EN NIA KOLEKTO

Kiom da homoj, tiom da gustoj - diras proverbo. Kaj kiel malsimilaj estas ni homoj, tiel malsimilaj povas esti ankaŭ niaj E-kolektoj kaj kolekt-manieroj. Por nia plezuro ni povas kolekti kion ajn kaj tute neglekti principojn kaj regulojn filatelajn. Tamen kiam ni volas havi kolekton filatele valoran, ni devas obei kaj sekvi regularon, precipe ĉe kolektoj, destinitaj por ekspozicio, alie ni ne evitos malsukceson. Mi ne volas pritrakti konstruon de tia kolekto, sed volas menciigi kelkajn teknikajn flankojn de stampoj.

Ne multe gravas, ĉu la stampo estas sur koverto, poŝtkarto aŭ paperpeco, precipe ĉe malnovaj stampoj, kie ni ne havas eblecon elekti el pluraj pecoj. Ĉefa afero, ke la stampo estu klara, bone legebla. Se ni povas elekti, ni preferos porokazan koverton aŭ poŝtkarton, sed ne estas kondiĉo. Skribi propran adreson sur blanka koverto kun stampo kaj tiel ŝajnigi perpoŝtan vojaĝon ne havas sencbon, ĉe ordinaraj leteroj ne estas pruvo pri ilia transporto poŝta krom malpura kaj ĉifonita koverto. Stampoj ne estas pm, ĉe kiuj ni distingas neuzitajn de uzitajn. Tasko de stampo estas alia ol ĉe pm, eĉ kontraŭa. Komence oni uzis ĝin nur por nuligi poŝtmarkon sen alia signifo /mutaj stampoj/, poste oni aldonis daton kaj nomon de loko, kaj nunaj stampoj, precipe memorigaj, informas, rakontas, varbas...

Kutime, do, stampo akompanas poŝtmarkon, tio estas senco de ĝia ekzisto. Tamen ankaŭ aparta represado de stampilo sen poŝtmarko havas plenan filatelan valoro kiel poŝta dokumento en ĝusta loko de motivkolekto.

Poŝtmarko povas multe influi filatelan valoron de ĉiu stampo. Ne alteco de nominalo, sed ĝia speco. Idea la estas pm, eldonita je la sama okazo kiel la stampo, kaj la pm ne necesas rilati Esperanton. Ekzemple stampo pri Foiro en Poznań havu pm, eldonitan por la Foiro, aŭ almenaŭ pm kun bildo de Poznań. Se tia pm ne ekzistas, ni eble povos trovi alian parencecon: stampo por internacia tago de virinoj povas havi pm aŭ tutaĵon kun portreto de iu virino aŭ kun flormotivo, stampo de IFEF-kongreso pm kun fervojista motivo ktp. Kompreneble, plejparto de niaj E-stampoj apenaŭ donas eblecon trovi similan pm, konforman almenaŭ parte al la stampo. Tiam estas pli bone uzi pm neŭtralan, ordinaran, en malgranda formato kaj kieleble plej hela koloro. Tiajn filatelaĵojn la ekspozicia juĝkomisio certe pli alte taksos ol se stampon pri D-ro Zamenhof akompanas pm kun sportisto, ŝetanta lancon, aŭ eĉ tuta kolekto de diversmotivaj pm.

Tiujn ĉi konsilojn mi direktas ankaŭ al amikoj, kiuj en estonteco havos eblecon influi la aferon ĉe novaj stampoj aŭ mem prizorgi novan stampon ĉe poŝtgiŝeto.

Ankoraŭ kelkaj vortoj pri afrankstampoj. Ili estas sendube plenvalora materialo por niaj kolektoj, ĉar ili samtempe prezentas stampon kaj pm, kvankam pm estas prezentata nur per simbolo. Se iu entreprenno uzas afrankstampon dum pluraj jaroj senŝanĝe, ne estas necese serĉi pecon de ĉiu jaro, sufiĉas unu ekzemplero.

Afrankstampon KEHLET mi ne vidis, konas ĝin nur laŭ priskriboj en "FENIKSO" n-roj 21 kaj 24. Laŭ mia opinio, se ĝi tute ne havas mencion pri Esperanto, ĝi ne estas katalogenda, sed povas es-

ti bone uzata en ekspozicia objekto por demonstri eldonadon de Esperanto-literaturo. Sed ĉu la stelo en la afrankstampo ne estas sendube simbolo de nia movado? Se jes, kaj por la stelo ne estas ebla alia klarigo, ni povas ĝin ĝoje envicigi en nian katalogon.

Frank TICHÝ, Ĉeĥoslovakio

P.S. Ankaŭ ĉi tiu artikolo, verkita jam en aprilo de pasinta jaro, aperas kun granda malfruo; mi par donpetas de la aŭtoro kaj de la legantoj. La enhavo de la artikolo, tamen, estas daŭre aktuala.

Antonio DE SALVO, Roma/Italujo

ADRES+ŜANĜO

Alvenis al la redaktoro ĉi tiu letero:

"Mi bedaŭras, ke pro ega okupiteco mi tute ne respondis al mia filatela korespondado lastatempe.

La kaŭzo estas interalie adresŝanĝo. Mi estas nomita Estro de Fremdlingva Fako ĉe privata universitato en la apudeco de Novjorko. Jen bonvolu noti mian novan adreson:

Dept. of Languages, Adelphi University,
Garden City, L.I. NY 11530, Usono.

Mi estus dankema, se vi bonvolus publikigi tiun ŝanĝon en "Fenikso"; eĉ pli bone, kune kun pardonpeto pri mia lastatempa nerespando al korespondado.

Alia kaŭzo estas mia nomigo kiel Redaktoro de "La monda lingvo-problemo", taskon, kiun mi transprenis de d-ro V. SADLER (UEA).

Ekde la 30-a de majo kaj ĝis meza julio mi estos ĉe: Haus International (University of New Orleans in Munich), D-8 München, Elisabethstr. 87, FRG, poste ĉe miaj gepatroj en Skotlando kaj la

Universala Kongreso en Hamburgo.

Do mi fakte estos ĉe la novjorka adreso nur komence de septembro. Sed mi tuj forlasas Luizianon."

D-ro Richard E. WOOD

P.S. Mi kore gratulas d-ron Wood, ankaŭ nome de la AREK-anoj, pro liaj eminentaj atingoj en profesia kaj esperantista kampoj. La Redaktoro.

PRI LA POLA STAMPO LODZO 1964

La violkolora stampo pri la Tutpollanda Kongreso de Esperanto en la urbo Łódź estas apudstampo, certe poŝta, sed uzita nure en la sidejo de la Kongreso, en la loka Kulturdomo; ĝi ne estis uzita en poŝtaj giĉetoj oficiale, sed nur en la poŝta giĉeto en la Kongresejo. Mi mem partoprenis tiun kongreson kaj mi vidis samtempe, ke tiun stampon uzis la poŝta oficistino, kiu priservisz tiun giĉeton en la Kongresejo. Tamen tiu stampo validas nure, kiel esperanta aldonajo apud normalaj datstampoj de la poŝto; ankaŭ multajn korespondataĵojn mi elsendis tiam el tiu urbo al miaj konatoj kaj amikoj enlande kaj eksterlande. Tamen tiuj stampoj pli valoras kiel esperantaĵoj, ol kiel filatelaĵoj; tio dependas de ĝia teksto kaj poŝta karaktero. Oni eĉ forgesis menci la precizan daton de la Kongreso! Tion ŝuldas certe la organizintoj de la menciita kongreso, kiuj ne konsultis la poŝtajn preparojn ĉi-rilate.

Do, ankoraŭ unu kuriozaĵo en nia pol-esperanta filatelio! Tiujn kuriozaĵojn ni havas certe plimulte, kaj ili kune atestas, ke oni devas pli frue bone pri pensi ĉion.

Marian KOSTECKI, Krakòw (Pollando)

POR GLUMARKO-KOLEKTANTOJ

Post la apero de mia "alvoko al la esperantistaro" en "FENIKSO", kaj en la Informilo de la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno, mi ricevis informojn pri glumarkoj. S-roj MAYER, DE SALVO, GIL, AMOUROUX, PALU, transdonis al mi noveldonaĵojn aŭ informojn. Mi dankas sincere je la nomo de la kolektantoj. Mi donos resumon venonte.

Pli kaj pli, la kolektado de esperantaĵoj estas parto de la vigleco de la movado kaj, inter aliaj dokumentoj, la glumarkoj ankaŭ estas interesaj propagandiloj.

La katalogado de la por-okazaj glumarkoj estas ankaŭ dokumentaro por la ĝstonteco: la plej malnova katalogo, tiu de d-ro TAKACS, listigas la glumarkojn ĝis la jaro 1934. Poste, la katalogo de s-ro SAGET atingis la jaron 1954.

S-ro JENSEN daŭrigis la laboron kaj, ĝis nun, la tiel nomata "Katalogo JENSEN" estas la plej riĉa kaj unika en la mondo: oni trovas en ĝi la liston ĝis la jaro 1971. La lasta glumarko havas la numeron 773.

Post la forpaso de s-ro JENSEN kaj interkonsento kun la anoj de AREK, mi intencas daŭrigi la laboron post tiu lasta dato. Sed mi mem, sola, povas nenion fari: mi bezonas helpon de ĉiu unuopa esperantisto, de ĉiu loka grupo, naciaj aŭ internaciaj movadoj, transdonante al mi specimenon aŭ informojn de la noveldonitaj glumarkoj: okazo, urbo, lando, dato, formato, koloroj, konturoj, kvanto en ĉiu folio, eldonkvanto, ktp.

Kompreneble, se aliaj nekonataj glumarkoj antaŭ 1972-a estas malkovrataj, ankaŭ ili estos bonvenaj kaj listigitaj inter la aliaj numeroj.

Bonvolu sendi viajn informojn al mia adreso (afranku filatele, dankon): Gaston TREMON, rue Turgot 31, F-87350 PANAZOL (Francujo).

La represo de tiu ĉi alvoko, eĉ resume, estas dezirata en la esperantista gazetaro.

Gaston TREMON, Panazol (Francujo)

P.3. Nia kolego LINDSTRÖM, ĵus anoncis al mi, ke li posedas la katalogon de TAKACS, kaj ke li intencas ĝin sendi fotokopie al s-ro TREMON; pri la diversaj homoj, kiuj en pasinteco sin okupis pri katalogado de glumarkoj, mi volus ankoraŭ mencii / kvankam mi persone ne interesiĝas pri ĉi tiu kolekto-sektoro, kaj do havas nur nerektajn informojn / s-ron OBRZECIAN el Usono. La redaktoro.

FRANZ MAYER 90-JARA

La 7-an de aprilo 1974-a nia kolego s-ro WLUKA el Hannover (FRG) skribis al mi: "Grava afero! La 2-an de majo 1974-a festos nia fidela amiko Franz MAYER (AREK n-ro 25) sian 90-jaran naskiĝtagon. Bonvolu en "FENIKSO" aŭ skribe tiun okazon en iu formo estimi aŭ honori".

Kun ĝojo mi tion faras hodiaŭ. Mi estas ankaŭ persona korespondanto de s-ro MAYER, kiun mi vere admiras pro lia daŭra interesiĝo pri kolektado, malgraŭ la aĝo. Laste mi ricevis de li karton, datitan la 28-an de marto 1974-a, kiu interalie diras: "Mi ricevis koverton kun E-stampo St. Etienne / temas pri la stampo; kiun s-ro Tremon afable sendis al la AREK-anoj; mi kaptas la okazon por danki, nome de ĉiuj /; mi ĝojas pro ĉiu nova alkreskaĵo. Ankaŭ la glumarko-kolekto lastatempe bone progresis; nun mi havas 8332 diversajn ekzemplerojn".

Antonio DE SALVO, Roma (Ita)

ESPERANTISTOJ SUR JUGOSLAVAJ PM

Okaze de la Tago de la Respubliko, la Jugoslavia Poŝto eldonis serion el 8 poŝtmarkoj (malgranda okopo) kun figuroj de 8 naciaj herooj; en supra vico 4 pm po 0,80 dinaroj, en suba 4 po 2 dinaroj (eksterlanda leterafranko). La desegnaĵojn faris Andrej MILENKOVIĆ laŭ maniero inaŭgurita de slovena akademiano pentristo Božidar JAKAC. Eldonkvanto 300 mil serioj. La pm havas formaton 30 x 37 milimetroj, kaj la desegnaĵoj de 26 x 33. Estas pura hazardo, ke inter tiuj 8 figuroj aperis du esperantistoj (Radioje DAKIĆ kaj Ivo Lola RIBAR), kaj ne la merito de esperantistoj, kluj eksciis poste pri tio, nur ki- am aperis la pm.

Pli detalaj biografiaj informoj: Dakić naskiĝis la 27-an de novembro 1911-a en vilaĝo Crna Gora apud Jabljak, mortis la 13-an de januaro 1946-a en Moskvo. Metallaboristo, tre aktiva en la laborista movado, aktiva kiel esperantisto en Beogrado, en la jaro 1949-a proklamita Popola Heroo. Ribar naskiĝis la 23-an de aprilo 1916-a en Zagrebo, pereis trafita de malamika bombo la 27-an de novembro 1943-a, sur kampo Glamočko Polje. Studento, aliĝis al Naciliberiga batalo en 1941-a. Proklamita Nacia Heroo en 1944-a. Li partoprenis plurajn internaciajn junularajn Esperanto-Kongresojn (1935-a en Brudelo, 1936-a en Ĝenevo, 1937-a en Parizo), kaj la Internacia Lingvo, kiun li lernis en kvina klaso de gimnazio, helpis lin tiel same en korespondado kaj interŝanĝado de poŝtmarkoj.

Marinko GIJVOJE, Zagreb (Jugoslavio)
(el prelego farita dum Esperanto-elsendo de Radio Zagreb).

Adreso de s-ro GIJVOJE: P.p. 5025,
YU-41040 ZAGREB-DUBRAVA (Jugoslavio)

FRANZ JONAS, ESPERANTISTO

La nokton inter la 23-a kaj la 24-a de aprilo mortis en Vieno la Aŭstra Federacia Prezidento, Franz JONAS, en aĝo de 74 jaroj.

JONAS naskiĝis en Vieno la 14-an de oktobro 1899-a; la 3-an de oktobro 1969-a la Aŭstra Poŝto memorigis lian 70-jariĝon per 2-ŝilinga poŝtmarko (en tiu okazo estis ankaŭ uzita speciala stampo, en germana lingvo, kun la aŭstra emblemo kaj la teksto: 1150 WIEN 3.10.1969/ FRANZ JONAS/ 70. GEBURTSTAG DES HERRN BUNDESPRÄSIDENTEN/ AUSSTELLUNG DES 1.O.A.B.S.V.; pri tio, kiu povas klarigi la signifon de la skribaĵo?).

JONAS estis elektita Prezidento de la Aŭstra Respubliko la 23-an de majo 1965-a, rekte de la popolo, kaj li estis konfirmita en la alta posteno la 25-an de aprilo 1971-a. La antaŭvido pri la rezulto de la balotoj estis facila: JONAS (kiu, pli frue, estis urbestro de Vieno) estis populara, kaj amata ankaŭ de tiuj, kiuj eble ne tute ŝatis Prezidenton kun laborista deveno (li laboris kiel kompostisto, antaŭ ol preskaŭ hazarde li komencis sian politikan vivon).

JONAS estis esperantisto, kaj eĉ aktiva, kompreneble laŭ la eblecoj de sia posteno. Antaŭ la milito, li estis sekretario de la "Aŭstria Laborista Ligo Esperantista", instruis Esperanton en laboristaj rondoj, verkis artikolojn kaj faris multajn publikajn paroladojn. Li kunlaboris en la Lokaj Kongreskomitatoj por la UEA-Kongreso 1924-a kaj por la SAT-Kongreso 1925-a en Vieno.

Kiel tatprezidento, JONAS, precipe dum siaj vojaĝoj al eksterlando, substrekadis sian esperantisticon, akceptis esperanto-delegaciojn, parolis Esperante kun esperantistoj (mi mem havis ĉi tiun hono-

ron, la 17-an de novembro 1971-a; pri la aŭdienco al grupo de romaj esperantistoj - inter kiuj troviĝis ankaŭ mi - kaj pri la esperantisteco de JONAS raportis la prestiĝa roma ĵurnalo "IL MESSAGGERO" de 9.12.1971).

Okaze de la Universala Kongreso en Vieno en la jaro 1970-a, JONAS ne nur akceptis esti Honora Protektanto, sed li ankaŭ alparolis en Esperanto la kongresanojn.

Ripozu en paco, elstara Samideano!

Antonio DE SALVO, Roma, Italujo
(koncizigite, el elsendo de Radio Roma/Esperanto)

INFORMOJ DE LA AFERGVIDANTO

La membroj pli akurate pagis ĉi-jare, spite la pli altan kotizon.

Aperis nova eldono de la stampo-katalogo de BURMEISTER, kun multaj bildoj (recenzo sekvos).

Estis komencita la reskribado de la tutaĵ-katalogo de VANA, kiu estas vere bezonata.

LEVICAROV (Bulgarujo, "La kolektanto") kaj MELO (Francujo, "La esperantista kolektanto") alvokis al kunlaboro; ni raparolu pri la afero post nia aŭtuna kunveno en Karl-Marx-Stadt (se ĝi okazos), aŭ en Opava dum septembro, okaze de filatelista kunveno. Ni devas decidi, ĉu ni povas kunlabori, konsiderante, ke ni tenas nin al la temo "Esperanto", kaj ne al ĝeneralaj filatelaj kaj numismatikaj temoj.

Mi intencas, se ne lasi la gvidantan postenon, almenaŭ iamaniere havi help-gvidanton, aŭ vicprezidanton je mia flanko.

Ivar PAULSSON, Solna, Svedujo

GUGLIELMO MARCONI KAJ ESPERANTO

La 24-an de aprilo 1974-a pasis 100 jaroj de la naskiĝo de Guglielmo MARCONI, unu el la plej grandaj sciencistoj de nia erao. Okaze de la evento, la itala Poŝto eldonis 2 poŝtmarkojn, respektive en valoro de 50 kaj 90 liroj, kaj uzis (kaj ankaŭ uzos dum la kuranta jaroj) plurajn specialajn stampojn. Poŝtmarko (en nominalo de 0,40 frankoj) ankaŭ estis eldonita de Monako. Krome, pli frue pluraj ŝtatoj (ekzemple, Ĉeĥoslovakujo kaj Britujo) honorigis la scienciston per pm.

Malgraŭ la aserto troviĝanta sur la konata soveta pm de 1925-a, laŭ kiu "inventisto de radio" estas Popov, ne ekzistas dubo, ke oni ŝuldas al MARCCNI la eltrovon de fizikaj principoj kaj ilian aplikon, kio ebligis konkrete la ekziston de Radio.

Ekde la unuaj jaroj de la radio-elsendoj, ankaŭ Esperanto sonoris tra la etero; jam en 1925-a okazis la unua regula Espranto-programo ĉe la itala Radio (tiam en Torino), kaj en 1935-a komenciĝis la kurtonda programo al eksterlando en Esperanto, kiu daŭre elsendiĝas el Romo, kaj kiu ankorau nun ekspluatas la antenon starigitan de MARCONI.

Okaze de la apero de la italaj pm-oj kaj de la uzo de specialaj stampoj, mi eldonis poŝtkarton (per kiu mi pretigis filatelaĵojn), kiu reproduktas artikolon aperintan en la numero 1-2 de la jaro 1934-a de la itala revuo "L'Esperanto". Sub la titolo "Lia Ekscelenca Moŝto MARCONI favore al universala lingvo", la revuo aperigis foton de la sciencisto kaj ĉi tiujn vortojn, en itala lingvo:

"Dum lia ĵusa vizito al Japanujo, Lia Ekscelenca Moŝto MARCONI partoprenis en bankedo, propo-

nita honore al li de la aùtoritatuloj kaj eminentuloj de Tokio. Li parolis en la angla, kaj inter la temoj mallonge pritraktitaj estis la eblaco de universala lingvo, eventuale naskiĝonta helpe de Radio.

""Guste nun okazas al mi - diris L.E.M. MARCONI - ke pro mia nescio de la japana mi estas devigata alparoli vin en la angla. Kiu povas diri ĉu, pro la konstanta kaj ĉiam kreskanta uzo de radiokomunikoj, iam oni trovos novan rimedon por esprimi siajn pensojn, kiun ĉiuj povos adopti kiel universalan lingvon? Kia plejbona kronigo de la radiaj progresoj, verdire, se, samkiel la elektraĵoj ondaj ĉirkaŭiras la mondon, la simboloj, kiujn ili kutimas ĉien disvastigi, utilis kunigi ĉiujn popolojn en unu solan blokon de interkompreniĝo kaj bonvolo! Tio povas aspekti pli vizio de poeto ol opinio de sciencisto: sed la scienco ne estas tute sen poezio, kaj ĝi estas tre taŭge helpata de la imagopovo. Aliflanke, mi opinias, ke mi rajtas aserti, sekve de ĉiuj eksperimentoj faritaj pere de radio, ke la plej grandaj ŝancoj estas antaŭ, kaj ne malantaŭ ni"".

Se iu havas intereson akiri la menciitajn maksimum-kartojn (poŝtkarto + serio de poŝtmarkoj + unuataĝa stampo), mi havas limigitan kvanton je dispono (entute mi pretigi apenaŭ 70 ekzemplerojn), kontraŭ taŭgaj filatelaĵoj (tutaĵoj kaj stampoj pri ĉiuj temoj, aŭ unuataĝaj kovertoj kaj maksimumkartoj pri fervojoj, aŭtomobiloj, muziko, astronomio, ŝipoj, aviadiloj, scienco kaj tekniko, sporto, skoltoj, hundoj, fiŝoj, ĉevaloj, filmo, religio, italaj aferoj). Bonvolu kalkuli, ke pro la limigita eldonkvanto, pro la kosto de la poŝtmarkoj kaj pro la elspezoj koneksaj kun la ricevo de la speciala stampo, ĉiu ekzemplero kostis al mi la egalvaloron de 4 leterafrankoj al eksterlando.

Antonio DE SALVO, Roma, Italujo

PRI LA ESPERANTO-TUTAĴO EL HODONIN

Okaze de la 4-a renkontiĝo de E-sekcio kaj simpozio "Esperanto en filatelio" en la urbo Hodonin (Ĉeĥoslovakio) dum tagoj 13-15.4.1973, enkadre de internacia ekspozicio de poŝtmarkoj "Hodonin 1973", oni eldonis E-poŝtkarton.

Temas pri ordinara poŝtkarto kun presita pm en nomin lo de 0,30 kronoj. Sur la maldekstra duono de la poŝtkarton oni presis privatan nigran surpreron, zorge de s-ro Dolfa Bartoŝik el Praha. Surpreson faris presejon en urbo Kyjov, eldonkvanto 400 pecoj. La poŝtkarton oni eldonis sole kiel memraĵpn el Hodonin, kaj ne kiel oficialan Esperanto-tutaĵon.

Vlada HASALA, CS-696 11 Mutěnice 687, Ĉeĥoslovakio (pli frue en Hodonin)

LA KUBA STAMPO NE ESTAS POŬTA

Jen letero pri la Kuba Esperanto-stampo, kiun mi ricevis en majo 1965-a, sed nur antaŭ nelonge denove trovis inter aliaj skribaĵoj:

"Bedaŭrinde mi devas informi al vi malagrablan novaĵon, kaj jen ĝi. La tiel nomata "unuataga koverto" eldonita okaze de la 2-a ekspozicio pri Esperanto en Camagŭey malhavas ian filatelan valoron ĉar la stampilo ne devenas oficiale de la Ministerio pri Komunikoj de Kubo. Tiu ĉi afero estas trompoŝtelo de junulo kiu perfidis min kaj celis atingi respondkuponojn de esperantistoj loĝantaj en kapitalismaj landoj. Li faris tian fi-negocon sen mia konsento, kaj pro tio ekestis dispartiĝo en la esperantista grupo de Camagŭey, kio bedaŭrinde mal-

purigas la prestiĝon kaj la seriozon de la E-movado ĉe okuloj de neesperantistoj.

Raúl Jaàrez Sedeño, Camagüey".

Werner SIMON, Memphis (Usono)

PRI LA LASTA HUNGARA ESPERANTO-TUTAĴO

Mi povis kompari kelkajn ekzemplerojn de la koncerna poŝtkarto, kaj jen miaj rimarkoj. Mi trovis:

- kartojn el iom glaciujmita kartoneto. Sur unu flanko estas enpresitaj: la E-marko, kelkaj indikoj en la hungara lingvo kaj la adreslimoj de la sendanto kaj de la adresato. Tiu ĉi karto ŝajnas al mi esti la normala eldono;

- kartojn el iom pli dika kaj pli sorba kartoneto. Sur unu flanko estas troveblaj la supre nomitaj enpresitaĵoj (inkluzive la E-marko), sed la dorso ne plu estas virga! Sur unu karto mi trovis la kompletan partituron de "La Espero", kaj sur dua stilizitan desegnaĵon, kiu reprezentas manon tenanta floron kaj la vortojn "Saluton! el Budapeŝto". La granda budapeŝta ponto troviĝas en dua plano. Eble samspecaj kartoj ekzistas kun aliaj desegnaĵoj aŭ teksto?!

Refoje io neklara kaj fantazia okazis:

- ĉu iu asocio enpresigis E-tekston dorse de oficiala poŝta eldono?

- aŭ ĉu la hungara poŝtadministracio enpresis la oficialan matricon dorse de E-kartoj?

Kiu povas respondi?

Jean AMOUROUX, Perpignan, Francujo

ANONCETO: Mi havas SVE 1, GER 3, aŭstran aerogramon; mi serĉas DA 1, SVE 2, SVI 1, 2.

Rudolf BURMEISTER, Karl-Marx-Stadt, GDR

ESPERANTO-MUZEO I NAŬGURITA

La 12-an de majo 1974-a, en la kadro de la solenaĵoj okaze de la Internacia Fervoĵista E-kongreso en Tarragona, estis inaŭgurita en Vilafranca del Penedes (Hispanujo) Hispana Esperanto-Muzeo, starigita de s-ro Luis Maria Hernandez Yzal. Temas pri konstruaĵo kun surfaco de 195 kvadrataj metroj, kun pluraj ĉambroj. La direktoro de la Muzeo kun plezuro akceptas kaj interŝanĝas esperantaĵojn; eventuale, post interkonsento pri la proponataj aĵoj, li estas preta pagi sendkostojn. Adreso: Luis M. Hernandez Yzal, Vilafranca del Penedes, Apartado 83, Hispanujo.

LUIGI EINAUDI

La 23-an de marto la italaj Poŝtoj eldonis 50-li ran poŝtmarkon memore al la 100-jara datreveno de la naskiĝo de Luigi EINAUDI, ekonomikisto kaj politikisto, iama Prezidanto de la itala Respubliko.

Luigi EINAUDI naskiĝis en la norda regiono Piemonto, doktoriĝis pri juro apenaŭ 21-jara, kaj akiris la katedrojn pri scienco de financoj kaj pri politika ekonomiko. En 1926-a, li devis forlasi la universitatan instruadon, por ne ĵuri fidelecon alla faŝisma reĝimo. Li kunlaboris al pluraj revuoj kaj ĵurnaloj, italaj kaj eksterlandaj, estris ekonomikajn revuojn, kaj ĉiam kondutis fidele al siaj liberalaj idealoj. Persekutita de la nazia polico dum la germana okupado, li rifuĝis al Svislando, de kie li revenis en 1944-a. Nomita reganto de la Itala Banko, li estis elektita por la Asembleo, kiu devis prepari la novan konstitucion, kaj aktive partoprenis en la laboroj.

En 1947-a, EINAUDI estis nomita Ministro pri Bilanco, kaj efektivigis iniciatojn, kiuj sukcesis

bremsi la tiaman inflacion kaj firmigi la aĉetopovon de la itala liro.

La 11-an de majo 1948-a, EINAUDI estis elektita Prezidento de la Itala Respubliko; li plenumis sian oficon kun firma modereco kaj prudenta diskreteco; en 1955-a, li fariĝis dumviva senatano. Li mortis en 1961-a.

EINAUDI rigardis al Esperanto kun aparta simpatio. En la numero 15 (majo/junio 1952-a) de la itala revuo "L'Esperanto", oni povas vidi foton kun titolo: "La ŝtatestro akceptas gravulojn de la Esperantomovado". La klarigo diras, interalie: "Advokato Raffaele BAGNULO, Prezidanto de la Organiza Komitato de la 24-a Nacia Esperanto-Kongreso (en Bolonjo), la 13-an de majo 1952-a prezentis al la Prezidento de la itala Respubliko, L.E.M. Luigi EINAUDI, grupon de konataj italaj esperantistoj, kiuj omaĝe donacis al li tri librojn binditajn: la tradukon de la "Historio de Kristo" de Papini, tiun de "Koro" de De Amicis, kaj la "Originaka Verkaro"-n de Zamenhof.

La Prezidento akceptis la grupon kun aparta simpatio, kaj restis kun ĝi preskaŭ duonhoron, vikle interesiĝante pri la historio, la strukturo kaj la disvastiĝo de Esperanto en la diversaj landoj de la mondo, laŭdante la agadon pacan kaj fratigan de la esperantistoj. Fine de la aŭdienco, li kompleze konsentis, ke oni fotu lin meze de la ĉeestantoj, por memorigi la eventon.

Ĉi tiu renkontiĝo konsistigas iusence kompletigon de la flataj vortoj, per kiuj la ŝtatestro akompanis la akcepton de la prezidanteco de la Honora Komitato de la 24-a Nacia E-Kongreso."

En la posta n-ro 16-17 de la sama revuo (julio/oktobro 1952-a), oni povas legi la tekston de telegramo sendita de Luigi EINAUDI al la menciita Kongreso.

Jen ĝi: "Dum la fidelaj anoj de Esperanto kunvenas en Bólonjo, en komuna aspiro de ĉiam pli konkretaj atingoj de ilia movado, mi nepre deziras havigi al ĉiuj kongresanoj, kune kun mia bondezira saluto, tiun tributon de sincera simpatio, kiun oni devas agnoski al ĉiuj, kiuj sindone laboras por la alproksimigo de la popoloj".

Mi havas je dispono, por interŝanĝo kontraŭ aliaj filatelaĵoj, poŝtmarkojn kaj unuatagajn kovertojn de Luigi EINAUDI.

Antonio DE SALVO, Roma (Italujo)
(koncizigite, el prelego ĉe Radio Roma/Esperanto)

LASTE APERIS

Ĝis nun, mi ricevis ekzemplerojn de ĉi tiuj E-stampoj de 1974-a:

ST ETIENNE (Francujo): varbstampo prepare al la Franca E-Kongreso. Mia ekzemplero havas daton 14.2.1974. La teksto (en franca lingvo) diras: "42 ST. ETIENNE FAURIEL/LOIRE/ CONGRES NATIONAL ESPERANTO/ST ETIENNE/ 30-MARS - 2 AVRIL" (afable sendis s-ro Tremon);

LIEGE (Belujo): Beneluksa Esperanto Kongreso. Miaj ekzempleroj havas datojn 13.4.1974 kaj 14.4.1974. Teksto en Esperanto: "BENELUKSA ESPERANTO KONGRESO/ 4000 LIEGE". Bildo de terglobo kaj monumento (nigra silueto);

TARRAGONA (Hispanujo): 26-a Internacia Kongreso de Esperantistaj Fervojistoj. Miaj ekzempleroj havas datojn inter la 13-a kaj la 15-a de majo. Teksto (plejparte malbone legebla) en la hispana: "TARRAGONA/XXVI CONGRESO INTERNAL FERROVIARIO ESPERANTO" - La redaktoro

